Esperanto-Lingva Konversacia Rondo de Losanĝeleso
Diskuto-Temo por Septembro 2004

La Televido

preparis Leston Buell

1. Demandoj

1. Kiom da horoj da televidaj programoj vi rigardas ĉiun semajnon?
2. Kiajn programojn vi preferas?
3. Kiom da horoj vi supozas, ke sona lernejano rigardas ĉiu-tage? Kio estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la televido por la infanoj?
4. Iu ajn televida programo kostas monon. Kiel pagiĝas tiuj kostoj? La respondo malsamas koncerne la privatajn retojn kiel NBC kaj Fox, la publikan reton PBS, kaj la privatajn elsendistoj kiel HBO kaj Showtime. Ekspliku kiel pagiĝas la produktado de la programoj en ĉiu el tiuj ĉi.
5. En kelkaj aliaj landoj, ekz. la Unuiĝinta Reĝlando, Francio kaj Sudafriko, ekzistas alia rimedo por pripagi la programaron. Ĉu vi konas ĝin?
6. Dum la lastaj jaroj foruras en Usono kaj kelkaj aliaj landoj la programoj nomataj angle *reality shows*. Supozu, ke alilandano, kiu tute ne konas la anglan, demandas vin, kio estas tio. Ekspliku la aferon al li.
7. Kiel oni povas informiĝi pri la horaro de la elsendotaj programoj?
8. Ekde la apero de la unuaj televidiloj, okazas daŭra evoluado de la televida teknologio. Ni priparolu iomete tiujn progresojn:
   - La unuaj televidiloj. Ĉu vi scias, kiam ili unue aperis? Kiel ili malsamis disde la nuntempaj?
   - La kabla televido kaj la satelita. Kiujn avantaĝojn ili alportas? Kial la kabla televido ne ĝuas grandan sukceson en multaj aliaj landoj komparate al la satelita?
   - La kolora televido.
   - La telekomand(il)o.
   - La surbendigilo kaj la persona televida surdiskigilo (PVR: *personal video recorder*), tia kiel Tivo.
   - La televido de altnivela klareco (HDTV: *high definition television*).

9. Laŭ vi, kiuj el tiuj evoluoj estas la plej gravaj?
10. Ekde la komenco, ŝanĝiĝis ankaŭ la programoj mem. Diskutu jenajn aspektojn de tiuj ŝanĝoj.
    - La haveblo de diversaj programoj.
    - La montrado de privataj aspektoj de nia vivo.
    - La montrado de etnaj kaj aliaj malplimultoj.
    - La prezento de la novaĵoj.
11. Vi eble havas sperton pri telvido en alia lando. Komparu la televidon de tiu lando al tiu de Usono.

2. Utilaj Vortoj

elsendi: *to broadcast*

elsendejo, stacio

televido: *television (but not in the sense of television set)*

televidilo: *television set*

spektaklo: *show*

programo

horaro: *schedule*

kanalo: *channel*

ekrano: *screen*

anteno

elektro: *electricity*

ondoj: *waves*

telekomando/telekomandilo: *remote control*

cenzuri: *to censor*

perturbo: *static (in television/radio reception)*

reklami, reklamoj: to advertise, advertisements

aktoro

reĝisoro: *director (in film, television, etc.)*